

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advok., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 173
6. 1. 1924

Redakcio:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem bei Köln, Germanlando.

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,20 sv. fr. por landoj, kies valuto
suferta maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fr. (ĉe anstataŭ pago 0,15 sv. fr.),
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Esperanto radiotelefone aŭdita je distanco de 5000 km. (Paĝo 3!)

Nova jaro — nova espero.

En la novjara numero de la pasinta jaro ni skribis, ke la samideanoj povas esti tute trankvilaj pri la estonta sorto de ET. Sed samtempe ni aldonis ke, kompreneble, por la daŭra sukceso de de ET ni bezonas la planan konfidon de la abonantoj, en estonteco ankoraŭ pli ol ĝis nun.

Hodiaŭ ni povus skribi la samon. Pro la grave ŝanĝiĝintaj ekonomiaj cirkonstancoj en Germanlando, kiu — sur la internacia merkato — el plej malkara lando (ĝis aŭgusto 1923) nun fariĝis la plej multekosta en la tuta mondo, la situacio de ET iom malfaciliĝis. Sed tute ne estas timo pri ĝia plua ekzistado. Ĝi nur bezonas, en ĉiam pli alta grado ankoraŭ la planan konfidon de la gesamideanoj.

En la pasinta jaro la nombro de niaj abonantoj ja ne progresis. Sed ni sukcesis, iom post iom ankaŭ ĉe la malbonvalutuloj, atingi abonprezojn, kiuj estas preskaŭ sufiĉaj, sed ankaŭ nepre necesaj por la sekura ekzistado de ĉiu-semajna Esp. ĵurnalo. Cetere, la nova fikso de la abonprezoj ŝajnas al ni pli justa kaj pli simpla ol la ĝis nun aplikita sistemo: ĉiu abonanto en malbonvaluta lando nun devas pagi senescepte egalvaloron de 0,05 dolaro resp. de 0,25 svisa franko, kaj ĉiu abonanto en bonvaluta lando pagas egalvaloron de 0,06 dolaro resp. de 0,30 svisa franko. De semajno al semajno la prezoj por landoj kun nestabila valuto estas reviziotaj laŭ la plej novaj kurlizistoj. Sed esprimite en dolaroj, svisaj frankoj aŭ alia stabila valuto, la prezoj restos la samaj kaj ne ŝanĝiĝos.

Do, la ĉefa sukceso, kiun ET atingis en la pasinta jaro, estas — krom la aldonado de monata komerca gazeto kaj la ĉiutaga aperado kiel kongresbulteno dum la XV-a en Nürnberg — la plifirmigo de ĝia financa bazo. Ĝia tasko por la nova jaro estas firmeni la jam atingintan pozicion kaj plukonstrui sur la ĝisnunaj sukcesoj, — trankvile, sen granda bruo, provizore ankaŭ sen gravaj novaj planoj —, subtenate per la konfido kaj fideleco de ĝiaj abonantoj, per la esimo kaj bonvolo de la tuta esperantistaro. Tiel ET povas eniri la novan jaron sen timo kaj kun kuraĝa espero.

Reŝirigante la ĝeneralan Esp. movadon dum la jaro 1923, ni povas konstati precipe du belajn sukcesojn: la Komercan Konferencon de Venecia, kiu aliris al nia movado la interkonsento de multaj seriozaj rondoj, kaj la XV-an Universalan Kongreson en Nürnberg, kiu per la impona nombro de partoprenantoj (preskaŭ kvinmilo!) superis ĉiujn ĝisnunajn Esp. kongresojn.

Bedaŭrinde ni devas kronikigi ankaŭ diversajn neagrablojajn: la „fame konatan“ cirkuleron de la franca ministro Bérard kaj la morton de kelkaj bone meritintaj samideanoj: D-o Ed. Mybs, Kol. John Pollen, Prelato D-o A. Giesswein k. a. Ni bedaŭras ilian foriron; sed samtempe ni esperas, ke novaj batalantoj ilin anstataŭos, ke niaj vicaj fariĝos eĉ pli densaj kaj ilia forto pli efika, por ke ni pli kaj pli proksimiĝu al nia celo: la paca konkero de la mondo por nia ideo — la ideo de lingvo tiumonda!

Do, kun nova espero en la novan jaron! T.J.

Subtenu la oficialajn instituciojn!

Kiu rapide donas, tiu donas duoble.

Alvoko al la X-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Al la esperantistaj verkistoj:

La Komitato de la X-aj Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni en la jenaj konkursoj.

Ordinaraĵoj temoj

Originalaj tekstoj

- I. Originala versaĵo kantanta A m o n.
- II. Originala A m a verko en prozo.

Tradukitaj tekstoj

- I. Traduko de unu el la jenaj versaĵoj.
- II. Traduko de la prozaĵo „El gore blank“, de Martí Gents i Aguilar. (Eldono de „Biblioteca de Auteurs Vigatans“).

La du eminentaj aŭtoroj, ambaŭ loĝantaj en la kongresurbo Vich, atable donis la permeson por tradukado de iliaj verkoj.

Eksterordinaraj temoj

- I. Premio de la Ekscelenca Urbeŝtaro de Vich: 300 pesetoj. Temo: Originala verko.
- II. Premio de Lia Moŝto D-o Francisko Muñoz, Episkopo de Vich: 100 pesetoj. Temo: „La Katolikismo kaj la Paco“.
- III. Premio de Lia Moŝto s-o Albert Rusiñol, Parla de Vich: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- IV. Premio de la „Terkulturista Ĉambro Ausetana“: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- V. Premio de la „Terkulturista Sindikato“ de Vich: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VI. Premio de la „Vika Industria Societo“: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VII. Premio de la „Katolika Junularo“: 50 pesetoj. Temo: Traduko de versaĵo aŭ prozaĵo de la fama poeto kataluna Verdager.
- VIII. Premio de la grupo „Vika Esperantistaro“: 100 pesetoj. Temo: Originala teatraĵo aŭ novelo.
- IX. Premio de la „Kanariistoj de Vich“: Bela ekzemplero de la famaj Vikaj kanarioj en laŭna kaĝo. Temo: „La amo al la birdoj“.
- X. Premio de la komerca firmao „Vda. de J. Sendra“: Tipa kolbaso de la speciala elaborado, kiu famigas la urbon Vich. Temo: „Bonhumora versaĵo“. (La donacanta firmao ofertas sendi en konvena pakajo tiun „premio“ al iu ajn lando).
- XI. Premio de „Vika Kazino“: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- XII. Premio de „Kataluna Esperantisto“: Dumviva abono al la gazeto. Temo: „Pri la esperanta versfarado“.
- XIII. Premio de „Ateneu Enciclopèdic Popular“: 25 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- XIV. Premio de la grupo „Barcelona stelo“: Tri lukse bnditaj volumoj enhavantaj la faman tradukadon de Kabe „La Faraono“. Temo: Rakonto pri „Kio plej impresis min dum mia vivo“.

Aliaj eksterordinaraj premioj espereble estos proponataj. Ni anoncos ilin en proksima numero de „Kataluna Esperantisto“.

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo.

Th. Cart, prezidanto. — Julio Baghy. — Jacinto Bremón. — Jacinto Comella. — Estantislau Pellicer. — Jaume Grau Casas, sekretario.

Notoj

I. La aŭtoroj de la kvar premiitaj Ordinaraĵoj Temoj (Originalaj Tekstoj I, II; Tradukitaj Tekstoj I, II) ricevos lukse bnditajn ekzempleron de la verko „Amfiltrino“ de la senmorta Molière, majstre tradukita de s-o E. Legrand.

II. Al la aŭtoroj de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraĵoj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la Naturan Floron kaj la rajton elektii Reĝinon de la Festo.

III. La verkoj prezentotaj devas esti verkitaĵoj en plene Fundamenta Esperanto kaj ne ankoraŭ eldonitaj, nek anoncitaĵoj.

IV. La Festo de la X-aj Internaciaj Floraj Ludoj okazos en Vich, dum la XI-a Kongreso de „Kataluna Esperantista Federacio“, en junio 1924.

V. Sur la manuskriptoj — kiuj devas esti ricevitaj antaŭ la 15. aprilo 1924 de la sekretario de la Floraj Ludoj (s-o Jaume Grau Casas, Claris, 72, Barcelona) — oni devas skribi devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI. Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj. Oni konservu kopion de la manuskriptoj.

VII. La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu el la konkursoj.

VIII. La komitato publikigos la verdikton per „Kataluna Esperantisto“ kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi.

IX. La premiitaj verkoj fariĝos propraĵo dum unu jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo en „Kataluna Esperantisto“ aŭ „Literatura Mondo“. Permeson por reproduktado dum tiu unua jaro oni devas peti de la redakcio de K. E.

X. Eventuala aljuĝo de „Subpremioj“ nur signifas honoran mencion, ĉar ne estas iuj efektivaj premioj, krom tiuj difinitaj en la nuna alvoko.

Socia vivo.

Rezultatoj de la Movado pri Fabrikejaj Konsilantaroj en Germanujo.

Gravaj informoj pri la rezultatoj de agado de fabrikejaj konsilantaroj (Betriebsräte) en Germanujo, informoj bazitaj sur la raporto de laborinspektantoj, aperis en la novembro numero de la Internacia Labora Revuo. Ŝajnas, ke la konsilantaroj iom post iom kutimiĝas al la taskoj komisiitaj al ili de la leĝo. La patronoj ankaŭ kutimiĝas al la konsilantaroj, kaj multaj patronoj kore laŭdas ilin faradon. La nombro de konsilantaroj tamen malpliĝis, ĉar estis ofte neeble trovi laboristojn kiuj volis prezentiĝi por elekto.

Fabrikejaj konsilantaroj faris malmulte por favori la efikecon de la entreprenoj, foje tial, ke ili ne povis decidigi la laboristojn akcepti la rimedojn, kiujn ili mem rekonis kiel pravajn, foje tial, ke ili mem ne komprenis la neceson de la rimedoj proponitaj. Ili ofte troviĝis en malfacila situacio, kiam ili devis konsenti al proponoj por ekstralaboro, aŭ al sciigoj pri intenco fermi la entreprenon.

Oni regule invitis fabrikejajn konsilantarojn partopreni en inspektado. La laborinspektantoj notis, ke individuaj laboristoj malkaŝe esprimas siajn opiniojn en ĉesto de la fabrikeja konsilantaro. kvankam antaŭe ili ofte montriĝis retenemaj, tial ke ili timis esti punataj.

Internacia Labora Oficejo

Kroniko.

Por servi nian legatarojn per ĉiam aktuale, fidinde kaj kompleta informaro, ni bezonas scigilojn (aŭ postkartojn aŭ aparta folio) unuflekse skribita, sed ne inter administratistojn (privatigitoj) pri ĉia novaĵo de la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

Anglujo.

Londono, 10. nov. S-o Lane gvidis „Tradukon Vesperon“ kun granda sukceso. Oni tre ŝatas tiun vesperon, kiam ofte aranĝas s-o Lane pro ilia alta kompetentiga valoro.

— 18. nov. Debato pri „Ke edzinoj rajtas havi eksterhejman okupon“ malfermis nia lerta kaj fervora s-anino f-lino Langella kontraŭ s-o E. E. Yelland.

Resumo: La malfermito, f-lino Langella ricevis la subtenon de preskaŭ ĉiuj ĉesantitoj, kiuj opiniis, ke edzinoj rajtas havi eksterhejman okupon egale kun elzjoj.

— 25. nov. Debato pri „Senlaboreco kaj Imperia Preferado“ estis la titolo de parolado de s-o Fairman.

Resumo: La plimulto de la ĉesantitoj opiniis, ke „Imperia Preferado“ (protektado de imperia komercado), kiel rimedo solvi la problemon de senlaboreco estus neracia, ĉar anstataŭ plibonigi aferojn ĝi pliintensigus la nunan teruran situacion. E. Read.

Aŭstrio.

Loeben (Stiro). En la belega stira urbo Loeben nia movado tre forte ekvigiliĝis. La intereso estas tiel granda, ke la loka grupo devis komenci du kursojn (80 p.) kaj prepari trian por laboristoj. Ĝoigis estas, ke precipe la ĝeneraistoj kaj iliaj estraroj fervore lernas Esperanton. La kursoj okazas en la burĝa-lernejo.

Franujo.

Departementa Kongreso de Esp. en Perpignan.

La Esp. kongreso de la departemento Orientaj Pireneoj kiu okazis en Perpignan la 9. dec. havis grandan sukceson.

Dimanĉon matene je la oka la kongresintoj alvenintaj el Cérêt, Espira, Narbonne, Aigné, Béziers, Marsaille kaj Vich, Terrassa (Hispanujo) estis akceptitaj ĉe la stadodomo. Je la 9-a h. en la ĉambrego de l' Hispana Centro la kongreso malfermiĝis antaŭ 100 gesamideanoj. S-o René Beck, prez. de la Esp. Mediteranea Federaco, honore prezidis. S-o Joseph Sans, prez. esprimis la bonvenon al la kongresintoj. S-o René Lech, la juna ĉeskr. faris propagandoraporton kaj alvokis ĉiujn esp-istojn por ke ili farigu veraj propagandistoj. S-ino Julia sekr-ino de la aktiva grupo en Cérêt (Pyrenées Orientales) alportis la salutojn de la ĝenoj de Cérêt kaj dankis al la organizintoj. S-o René Beck parolis pri la neceso de la mediteranea federaco por la restarigo de grupoj. S-o Comella (Vich) kaj Chaler (Terrassa) alportis al la kongresintoj la fratajn salutojn de la Hispanaj gesamideanoj kaj invitis la kongresintojn ĉesti la katalunan kongreson kaj la forajn ludojn, kiuj okazas en Vich je penekosto (junio 1924). S-o Rued salulis la kongresintojn je la nomo de la lialaj samideanaro. Post akceptado de diversaj deziroprimoj oni fiksis la proksiman departementan kongreson por Cérêt (eble tiu kongreso okazos samtempe kun la federacia kongreso (Pasko, aprilo 1924). Antaŭ ol fermi la kongreson la ĝesp-istoj kantis „La Espero“.

Tuj poste oni reprezentis „La Rubeno“, esperanta komedio en unu akto, vigne ludita de sam-inoj Farré kaj Lense kaj samideanoj René Lech, Sautarel, Carreras. S-oj Amour, Lech eldiris monologon. Okazis festeno agrabla kaj ĝoja.

Je la 16.30 h. s-o René Beck, faris francan paroladon pri „Zamenhof kaj lia verko“; dum la parolado farita antaŭ publiko esp-ista kaj neesp-ista oni rikoltis 60 (ses dek) frankojn por la monumento de nia kara majstro.

Post dancoj kaj amikaj kunvenoj la kongresistoj el la regiono foriris.

La kongreso faris bonajn propagandon en Perpignan kaj oni ricevis novajn aliĝojn. La gazetaro favore raportis. René Lech.

P. S. Ni dankas „France Esperanta“, „Esperanto Triumfonta“, s-o Carbone, f-inoj Rokasano, Soler k. a. por iliaj gratuliloj. Nia devizo estas: „Ĉiam antaŭen, al nia alia celo!“

Germanujo.

Esp. Gruparo Berlin.

Okaze de la naskiĝtago de la majstro, oni aranĝis la 18. dec. 1923 Zamenhof vesperon. Parolis D-o Hanauer.

La monataj kunvenoj de la grupero de nun regule okazos ĉiun 8-an mardon monate, je la 7 1/2 h. en kafejo

„Josty“, Am Potsdam Platz, 1. e'ago, la venonta kunveno la 15. jan. 1924 (Jarkunveno). Esp-istoj, trapasontaj Berllin, estas kore invitataj. H. N.

Potsdam. La ĉi tie nauklasa mezgrada lernejo por knabinoj baldaŭ havas 10-an superan klason, en kiu la knabinoj estas instruitaj por la taskoj de komercado kaj masstrumado. En la programon s-o rektoro Günther volas alpreni kel fremdlingvaj fakojn anglolingvan korespondadon kaj Esperanton. — La gesamideanoj, precipe la eksterlandaj, estas petalit, sendi kelkajn linojn de aprobo aŭ danko al s-o rektoro Günther. (Adreso: Potsdam, Charlottenchule, Germanujo).

Italujo.

Torino. En la lernejo G. Pacchiotti (Via Bertolo 8) ĝenerala Mario Muretli malfermis kurson de Esp. antaŭ ĉirkaŭ 80 personoj. La Torino Esp. Asocio preparas la programon por la IX-a Itala Kongreso de Esperanto, kiu okazos antaŭ la Universala Kongreso de Wien. — En Torino la renkonto de la Esp. estas: Kafejo Fassio, Placo Carlo Felice n-o 12.

Kurso de Esperanto en la Reĝa Komerca Instituto Bari (Italujo).

La 20. dec. komencis kurso de Esp. en la Reĝa Komerca Instituto kun pli ol 40 lernantoj, inter ili kelkaj albanaj studentoj. La kurso estas sub la gvido de prof. A. Lacalendola, prof. de albana kaj rusa lingvoj en la Reĝa Komerca Universitato de Bari (R. Instituto Superiore di Studi Economici e Commerciali). La direktoro de la Komerca Instituto prof. Virginio Silva per sia aŭtoritato estas tre favora al kurso de Esperanto.

Oni esperas, ke la kurso estos tre utila, speciale por nia movado inter la albana junularo, kiu studas en la lernejoj de Bari (Italujo).

Litovio.

Mariampolė. La 8. dec. en la salono de Realgimnazio Administraro de L. E. A. Mar. Soc. Esp-ista aranĝis komunan propagandan paroladon pri Esperanto. Parolis s-o J. Macernis. Parolado daŭrigis 2 h. Cesisis multaj ĝeneraletoj k. a. civilanoj. Post la parolado kelkaj de aŭdantoj sin enskribis por aranĝataj Esp-kursoj. Kursojn gvidas s-o Prapuolenis. K. M.

Nederlando.

Helder (N-H). La 18. de dec. okazis bone vizitata kunveno en la klubo de Nova Sento, por festi la naskiĝtagon de nia majstro. Post salutaj vortoj de la prez. s-o C. Govers, s-o Joh. M. Duinker parolis pri la Unua Kongreso Esp-ista, dum s-o C. Govers laŭlegis la unuan kongresparoladon de nia Majstro. En la paŭzo oni aranĝis monokolektado, por kiu la gesamideanoj bonvole donacis la premiojn. La rezultato de ĉi tiu 10.000 oni forsendis al s-o Applebaum, Liverpool, por la Zamenhof-monumento. Post la paŭzo kaj komence de la vespero, f-lino V. D. Poll belege kantis kelkajn ĉarman kantojn, dum muzika trio, f-linoj Hense kaj f-ino Blom, nia ĝoigis per sia muziko. La kunveno fermiĝis lasante al ĉiuj kunvenintoj agrablan rememoron kaj kuragiĝon por la nova jaro de fervora laboro.

Polujo.

Róvne. La 2. dec. fondiĝis Esp-grupeto nomita „Antaŭen“. Kiel provizora prez. elektis s-o Šerman, kiel sekr. s-o Zilberštejn.

Rumanujo.

Bukurești. La 25. nov. en la Evangeliana Liceo okazis ekzameno de Esp-kurso. Cesisis antaŭ s-o R. Mint, direktoro de la liceo, kaj s-o prof. A. Reichmann. La ekzameno, prezidita de s-o Henrico Fischer, L.K., donis bonegan rezulton. La direktoro de la liceo esprimis sian miron pri la frappe flua parolo de la lernintoj de l' ses-semajna kurso, laŭtante la kursgvidintan liceonan s-on Siegmund Prager. Fine la ekzamena komisiono transdonis librobonaĉon al la biblioteko de la liceo.

— Nova kurso por 50 lernantoj de la ŝtata liceo Matei Basarab. Lecionoj okazas merkrede kaj sabate p. tm. 4—5 h. Instruas s-o T. Morariu.

— Presista sindikato „Gutenberg“ malfermis Esp-kurson. Partioprenas 52 personoj. Lecionoj vendrede vesp. 7—8 h. Gvidas s-o S. Prager.

Gradištea (urbeto apud Bukurești). En la ticia granda Normala Lernejo (prepararejo de instruistoj) komenciĝis la Esp-kursoj por 300 lernantoj. Lecionoj lunde mat. 8—9 h.

Rusujo.

Astranan. La 25. nov. estis ĝenerala kunveno de astrahanaj ĝes-anoj. Vespere la saman tagon je la 4 1/4 h. oni aŭskultis radio-koncerton el Moskvo en Esp. lingvo. Post

tio la s-ano de Moskva faris mallongan raporton pri la okazantaj radio-koncerto esperantolingvaj. La deklamado, kantado kaj parolado estis bone aŭditaj.

De la 26. nov. komenciĝis dismetado de materialo por ekspozicio. La 7. nov. ĝi estas malfermita kaj la jam bone vizitata. Oni sukcesis kolekti pli ol 185 diversajn Esp. gazetojn, pli ol 500 diversajn Esp. librojn, vortarojn, lernolibrojn, muziknotojn ktp., pli ol 70 diversajn gvidlibrojn, multo da diversaj folioj, komercreklaĵoj, propagandaj broŝuroj, folioj, diagramoj.

Antaŭ nelonge eklaboris kvara rondeto ĉe la lernejo „Politehnikum“. Partioprenas 25 pers. Gvidas k-do Paramonov. Oni intencas organizi duan grupon ĉe la sama lernejo.

En apudastrahana vilaĝoj niaj s-anoj ankaŭ rekomencis laboron.

Zajaĉij Ostrov. G-vo Volga, de k-do Kalinin estas konstruita aparte malgranda esp-ista dometo. En ĝi jam estas gvidata praktika kurso por 12 ges-anoj.

Petroparolovka. Alveturinta tien ĉi k-do Asjemier F. organizis Esp. rondeton. Funkcias Esp. kursoj.

Novo-Urusovsij poselok. K-do Borodin laboras tie ĉi en esp-ista rondeto.

Siberio.

Irkutsk. Nia afero sufiĉe bone progressis ĉi tie. Parolado en lernejo por Plenaĝoj „Karl Marks“, plene sukcesis. 120 anigis al kurso gvidata de s-eno Krujčok. En Irkutska Esp. Soc. 20 pers. anigis al pagita kurso. Instruas s-ano Babičev.

Scienco.

Honorario al sinjorino Curie.

El Paris oni anoncas: La ministro de la instruado prezentis leĝo-proponon al la Ĉambro en kiu li proponas donaci al sinjorino Curie, animo de la Akademio, profesoro de la Scienca Universitato, trovinto de l' Radiumo, okaze de ties dudekkvinjara jubileo la sumon de kvardek mil frankoj. La mono estus kvaraj naĉia donaco. La financministro aprobis la proponon. J. M.

Medicino.

La sistemo: „unu infanon“ kaj la gren-kolektado.

En multaj landoj kaj provincoj oni konas tiun socian malsanecon, kiu ne ĉiam povas esti klarigata per naĉiaj kaŭzoj. Laŭ fidnta anonco de la ĵurnalo „Világ“, Budapeŝt, iu hungara ĉefkuracisto observis, ke ne la vilaĝoj, kie domagadaj la greno-kolektado supre citita sistemo tre disvastigis. Estas fakte ke la greno-kolektado kaŭzas tre doloran naskon, ĉar ĝi atakas la uteron. La observo de tiu kuracisto estus mediiiga kaj devus esti konata de tiuj, kiuj okupas sin pri tiuj aferoj. J. M.

Naturscienco.

Ekspedicio, siatempe organizita de „American Museum of Natural History“ (Amerika Naturhistoria Muzeo) por esploroj en la Suda Maro revenis nun Amerikon post 3-jara krozado en la regiono de l' „Granda Insula Maro“ prokime de Marquesas (Markizaj Insuloj). La partoprenantoj, studesplorante multajn insulojn, konstatis ke preskaŭ ĉiu insulo havas sian lokan maloftajon de birdospecoj, disvastigitaj en la tuta regiono de l' Suda Maro. La gvidanto de la ekspedicio, D-ro Rollo H. Beck klarigas la fenomenon kiel rean pruvon de la Darwin'a teorio pri evolucio. Estas konate, ke la teorian rezultigis la studado de birda vivo sur la Galapagos-insuloj, kie Darwin estis vivanta longan tempon.

La ekspedicio trovis 50 novajn, ankoraŭ ne konatajn specojn de birdoj kaj alportis por la muzeo 6000 novan ekspozajojn. R. L. on

Preskaŭ vera okazintaĵo. (Silvestra letero.)

Kara, kompatinda s-o redaktoro!

Mi tre tre ĉagrenas, ke ĉio okazis, mi treege kompatas vin.

Kiamaniere mi eksciis la aferon? vi demandos.

Ho, mi mem, via fidela amiko, mi mem ja ĉestis, mi mem ja — bedaŭrinde — ludis rolon en tio, por vi tiel fatala silvestra vespero. Sed ĉar de alia flanko vi ricevis eblo tro konfuzajn kaj eĉ malsanajn raportojn, mi rapidas tuj post mia hejmenveno skribi doni al vi plej precizan ilustradon de la okazintaĵo.

Laŭ mia kutimo mi ankaŭ en ĉi tiu jaro intencis persone deziri al vi plej felician novjaron. Bonstate mi alvenis en Horrem je la kvara horo de l' silvestra posttagmezo. Elirinte de la stacidomo mi rimarkis en la stratoj ian strangan mallrankvilon kaj ekscitecon.

Ĉi tie okazis io eksterordinara, mi unue konjektis.

Kelkloke staris grupoj de kvar, kvin, ses homoj, viroj kaj virinoj, arde diskutante kaj gestadante.

Nu, eble tamen nur ia vilaĝa babiljaĉo mi poste pensis kaj preteriris. Sed konstante novaj grupoj formiĝis. Iuj insultis, aliaj diskutis, aliaj balancis la kapon kaj levigis la ŝultrojn, aliaj — ridis, jen mi vidis, ke en ĉiu grupo iu tenis gazeton en la mano kaj ŝajne laŭlegis ion.

„Nu, kion interesan raportas la gazeto, kamarado?“ mi demandis.

Kolere la demandito rigardis min.

„Ĉu interesa? Ili frenezigiĝis, ili komplete frenezigiĝis.“

„Kiu do?“

„Jen, sinjoro rigardu, ĉu vi jam vidis ion similan? Legu, se vi povas. Jen: „Horrem Tageblatt“ (Generalanzeiger für Horrem und Umgegend*). Tute en ordo, ĉu ne? Sed jen la teksto! Nenio ol nekompreneblaj, neelparoleblaj, konfuzepremitaj literoj.“

„Arogante“, aldonis virino.

„Tre maldeca silvestra ŝerco.“

„Mi morgaŭ malabonos.“

„Por tia senencaĵo mi ne fordonos mian monon.“

„Eble oni proklamis ankaŭ ĉi tie la Rejnlandan respublikon kaj tio estas eble nia nova gepatra lingvo.“

„Ho ho, ni tuj protestu kontraŭ tio.“

Ĉiuj samtempe parolis kaj estis ne la plej delikataj vortoj, kiuj pluvigis sur la gazetistojn.

Nur unu rigardon mi jetis en la gazeton kaj — ekridigis,

„Ĉu ili ne frenezigiĝis, sinjoro?“

„Jes, jes, ili frenezigiĝis“, mi respondis. Kara redaktoro, mi imagis kion vi faris! Ĉu la silvestra punĉo jam efikis en via kapo? Ha ha ha. Tro bone mi komprenis ĉion. Vi eble intermiksitis la du de vi eldonatajn gazetojn, ET kaj la germanlingvan ĵurnalon de Horrem. En la „Ĵurnalo“ vi presis la enhavon por ET kaj inverse. Kiel aspektos tiukaze ET? Kion diros la samideanoj, precipe la fremdlandanoj, ricevinte ĝin?

Mi volis klarigi la aferon, kiam ĵus la gazetodisonistino eliris el ŝu domo.

*) Ĵurnalo de Horrem, ĝenerala gazeto por Horrem kaj ĉirkaŭaĵo.

Tuj la amaso postkuris ŝin kaj kriegis haose:

„Haltu, haltu!“

„Kio estas hodiaŭ pri la gazeto?“

„Vi donis al mi maĝustan.“

„Tiu senencaĵoj mi ne legos.“

„Redonu al mi mian monon.“

Mi jam timis pri la kompatinda virino. Sed ŝi tre langolerte defendis sin.

„Ĉu tio estas mia afero? Mi ne presis la gazetojn. La jenajn oni doni al mi kaj ilin mi disdonas. Ĉu por la kelkaj fenigoj, kiujn mi ricevas, mi eĉ okupu min pri la enhavo? Turnu vin al la redakcio.“

„Jes, al la redakcio, al la redakcio“, ĉiuj kriegis kaj la kolera aro ekmoviĝis redaktejen. Konstante novaj personoj aliĝis. Mi mem nevole estis kunŝovata. Antaŭ la redakciejo la furiozo kaj la kolero atingis la maksimumon. Oni kriegis, insultis kaj blasfemis.

„Ni ne permesas, ke oni misifikas nin.“

„Ni ne toleras, ke oni mokas pri mi.“

„Ni postulas lojalajn por nia mono.“

„Retenu por vi mem la senencaĵojn.“

„Ni ne bezonas respublikan lingvon.“

„Perfidistoj, separatistoj!“

Unu saltis sur veturilo kaj faris incitantan paroladon. Pugno minacis kontraŭ la redaktejo. Oni frapegis kontraŭ pordo kaj fenestroj.

„He, malfermu, tuj malfermu!“

Kelkaj forŝiris laŭten de palisado, aliaj armis sin per bastonoj kaj ŝtonoj.

Ŝŝ! Tiutane fenestra vitro disrompiĝis.

Jen de interne iu malfermis la fenestron kaj la kapo de kompozita lernanto Karlo (tiu, kiu ĉiam kaŭzas la prerazerojn) aperis. Vidante la popolamason li kun krio retiriĝis. Sed tuj kelkaj

Feminismo.

Elektoratoj por virinoj en Italujo.

Laŭ sciigoj el Roma la prezidita de Giolitti komisiono pri reformo de elektoaroj finis siajn laborojn. La nova leĝo rajtigas al la virinoj en Italujo limigitan partoprenon en la elektoj. R. L.

Studenta movado.

Grava sciigo por la tutmondaj studentoj!

Ni vokas la atenton de la eksterlandaj samideanoj al dekreto de la itala registaro kiu decidis ke la fremdaj gestudentoj kiuj enskribiĝas kaj efektive partoprenas la kursojn de la ajn itala reĝa universitato ne devas pagi ian ajn lernokvoton. Sufiĉas ke ili pruvu per taŭga dokumento ke ili rajtas enskribiĝi en samgrada sialandane lernejo. Pliajn sciigojn la interesatoj povas postuli de Italaj Konsulejoj aŭ Ambasadejoj aŭ al Itala Esperantista Federacio (Casella Postale 25-Verona; Italujo).

Estus tre dezirinda afero, ke multaj samideanaj studentoj povus profiti de tia faciligo. Precipe ni pensas ke tio taŭgos por malbonvalutuloj de la landoj apud la maro, kiuj iam facile povas ankaŭ scii aŭ lerni la italan lingvon. Kaj plie ni petas ke ĉiuj eventuale profitintoj sciigu al ni almenaŭ la nomon kaj lernejon por ke ni utilu tian sukceson por la propagando de registaraj rondoj.

ITALA ESPERANTISTA FEDERACIO
Komuniko de Gazetara Oficejo
La Oficestro: Toschi.

Diversaĵoj.

Ventegoj kaj superakvegoj en Estonio.

La forpasanta aŭtuno estas eksterordinare pluvorika kaj ventega. Oftaj ventegoj multfoje difektis la telegrafan kaj telefonan retaron, forŝiris buojn kaj marsignojn kaj rezultigis multajn ruiniĝojn kaj damaĝojn surtere kaj surmare. Precipe fortaĵ estis la ventegoj en la fino de novembro, okazigintaj multajn malfeliĉojn kaj ruiniĝojn.

La 20. XI. sur la vasta Peipus-lagego ekfuriozis uraganforita ventego dum kiu la akvaro kelkloke elbordigis kaj superakvigis kelkajn fiŝistajn vilaĝojn. Multaj domoj kaj masstrumoj estas ruiniĝitaj de ondegoj, pontoj disŝiriĝitaj kaj laŭbordaj vojoj dislavitaj. La damaĝoj estas grandegaj. La telegrafo kaj telefono estas ree malfunkciigitaj.

La senĉesa pluvado, unika dum lastaj 50 jaroj, superakvigis la malaltaĵojn; multaj kampoj kaj herbejoj restas sub la akvo. La nivelo de la superplenigitaj riveroj minace altiĝas de tago al tago. La 22. XI. la nivelo de la rivero Enbach en Tartu (Dorpat) estis 325 colojn (ĉ. 8 metroj) pli alta ol kutime: plua altiĝo minacas la funkciadon de la urba elektra stacio. En Peterburga strato la enpenetrinta akvo estas forigata per pumpiloj.

Precipa danĝero minacas la ĉefurbon Tallinn (Reval). Ĝi estas provizata de akvo el la lago, kuŝanta sur la apuda montplataĵo. La konstante duonseka akvujo estas nun tiom plena, ke ĉiutage ĝi povas elbordigi kaj torente superakvigi parton de la urbo, lokita sur la marbordo. Simila katastrofo jam antaŭiris antaŭ kelkaj jardekoj; kvankam oni energie kontraŭbatalas la danĝeron, barante la minacatan bordon kaj

